

N-ro 1/2015  
27a jaro (2a periodo)



# inter ni dirite

- LA JUNULARA FORUMO

Redaktis: Vidar B. Skretting – Muntis: jpa

## Ĉu vi volas lerni lingvojn per nova, amuza metodo?

Saluton karaj esperantistaj  
junuloj! Jam venis la printempo  
kaj tuj venos la somero – kaj  
la landa kunveno de NJE! Ĝi  
okazos sabate je la 13a de junio,  
16.30–18.30 en Trondhejmo. Ĉiuj  
membroj de NJE estas invitataj.  
Ni elektos novan estraron, do  
prenu la ŝancon se vi volas esti  
en ĝi! Ankaŭ estos sufiĉe da  
tempo por amuziĝi kune kun  
aliaj esperantistoj de la tuta  
lando. Pliaj informoj venos  
en la venonta IND. Ankaŭ –  
ne forgesu la ĉi-monatajn  
Mojosajn Vesperojn! Bonvolu  
vidi nian Vizaĝlibran paĝon aŭ  
la retpoŝtliston por invito.

Esperanto estas facila lingvo, sed ni ĉiam povas  
plialtigi nian lingvonivelon, kaj multaj espe-  
rantistoj ankaŭ tre ŝatas lerni pliajn lingvojn.  
La usona operokantisto Gabriel Wyner antaŭ  
mallonga tempo lanĉis retpaĝon kaj publiki-  
gis libron pri sia metodo por lerni lingvojn. Ĝi  
similas al la “Rekta Metodo” de Stano Marček,  
do li opinias ke la plej bona metodo por lerni  
novajn lingvojn estas lernado sen uzado de  
alia lingvo, kaj la celo estas ke la lernanto povos  
pensi kaj esprimi sin en la lernata lingvo ekde la  
komenco, sen “tradukado” el la denaska lingvo  
enkape. La metodo de Wyner ne estas limigita  
al iu lingvo, sed proponas ilaron por lerni ajnan  
lingvon, fokusante je propra elparolo ekde la  
komenco, uzado de bildoj, kaj je la graveco de  
lernado de vortoj en ties propraj ĉirkaŭtekstoj.  
Mi mem tre uzas ĉi tiun metodon ĉiutage dum  
miaj lingvostudadoj (la araba kaj la persa), kaj  
havis bonajn rezultojn per ĝi. Kial ne provu?  
Vidu ĉe [www.fluent-forever.com](http://www.fluent-forever.com) (en la angla).



## Esperanto kaj la moderna hebrea – konstruitaj lingvoj kiuj sukcesis

Ni kutime diras ke Esperanto estis kaj estas la plej populara planlingvo tra la historio konsidere de la nombro de parolantoj. Ĉu ĝi vere estas tia? Eble ne – ĉar estis ankaŭ alia idealisto de la Rusa Imperio kiu prezentis novan lingvon dum la 1880aj jaroj krom Zamenhof. Lia nomo estis Eliezer Ben-Yehuda, kaj lia lingvo, la moderna hebrea, havas pli ol sep milionojn da parolantoj hodiaŭ. Nesuprizante, la plej multaj ekmirus pri la nomigo de la hebrea kiel konstruita lingvo aŭ planlingvo, ĉar ĝi estas la nacia lingvo de Israelo, kaj la Malnova Testamento skribiĝis hebrelingve. Tio veras, sed la hebrea nemulte paroliĝis kiel ĉiutaga lingvo eĉ en la tempo antaŭ Jesuo, kies denaska lingvo estis la aramea. Dum la tempo en diasporo, la judoj adoptis la lokajn lingvojn kun iuj ŝanĝoj kaj kreiĝis novaj judaj lingvoj kiel la jida kaj la judhispana. Dum tiu periodo, la ĉiutaga uzado de la hebrea certe ĉesis, eĉ se ĝia uzado kiel liturga lingvo daŭris.

Kiam la juda enmigrado al Palestino komencis, kaŭze de la ekflorado de la

cionismo en la diasporo, la plimulto de la novaj enmigrintoj parolis la jidan, kiun la plimulto kredis esti la oficiala lingvo en la juda ŝtato. Sed Ben-Yehuda opiniis ke nur la hebrea estas la propra lingvo de ilia ŝtato kaj komuna lingvo inter la malsamaj judaj grupoj. Li prenis radikalan paŝon, kaj decidis paroli nur la hebrea al sia filo, Ben-Zion Ben-Yehuda, kiu naskiĝis en 1882. Tiel iĝis la unua denaska hebrelingvano post du mil jaroj. En la komenco estis tre malgranda grupo kiu sekvis tian ideologion, kaj diriĝis ke en 1902, ankoraŭ estis nur dek familioj kiuj adoptis la hebrea kiel solan familian lingvon. Sed kun la sekvaj enmigradondoj, ĝi populariĝis, kaj iĝis la oficila lingvo de la ŝtato kiam ĝi fondiĝis en 1948.

### ĈU KONSTRUITA?

Sekvas la demando: Kiel eblas diri ke ĝi estas konstruita, kaj ne nur reviviĝinta lingvo? Pro tio, ke la hebrea kiu uziĝis en la Malnova Testamento kaj la juda tradicio tute ne estis adaptita por uzado en la moderna mondo. Mankis al ĝi vortoj por ĉiuj modernaj konceptoj, ekzemple aŭto, infanvartejo kaj eĉ tomato (kiu ne troviĝis en la antikva mondo). Tial Ben-Yehuda kaj kreis novajn vortojn el jamaj radikoj en la malnovhebrea, kaj prenis pruntvortojn el multo de aliaj lingvoj, ekzemple la germana, la jida kaj la araba. Sed adaptado de novaj vortoj ne estas la sola malsamaĵo inter la malnova kaj la moderna hebrea. Ĉar la lingvo ne uziĝis kiel ĉiutaga lingvo, la malsamaĵoj en la norma elparolo de la liturga hebrea kreskis multege dum la jarcentoj, kaj evoluis




Eliezer Ben-Jehuda (Wikimedia Commons)

distingeblaj variantoj de loko al loko. Finfine, Ben-Yehuda elektis la sefardan (judhispanan) varianton por moderna hebrea. Poste okazis aliaj grandaj ŝanĝoj, pro tio ke la plejmulto de la enmigraĵoj en Israelon venis el eŭropa lingvofono, kaj ilia elparolo tre influis la lingvon. Ekzemple malaperis multaj de la tipaj "semidaj" sonoj, kiel 'ayn, kaj iĝis la tradicia "rulanta r" "kartava r-o" kiel en la germana kaj la jida. Krom tio, la eŭroplingva fono de la unua lingvanaro de la moderna hebrea tre influis ĝian gramatikan kaj sintaksan strukturon, tiagrade ke kelkaj lingvistoj ne konsideris ĝin semida lingvo, sed speco de semid-eŭropa kreolo.

### MIRINDA

La revivado de la hebrea vere estas mirinda. Ĝi estis morta dum preskaŭ du mil jaroj, kaj revenis kiel ĉiutaga denaska lingvo por milionoj da homoj – kaj al ĉi tiu fenomeno certe mankas similaĵo en la mondhistorio. Moderna hebrea kaj Esperanto aperis samtempe en simila intelekta medio, kiel komunikilo inter homoj kun komuna ideo sed malsamaj lingvoj. Mi tial kredas ke ni esperantistoj povas lerni multon de la sukceso de la alia. En la komenco, la enkondukado de la hebrea certe ŝajnis



L. L. Zamenhof (el la arkivo de UEA)

nefarebla, kaj ĝiaj cirkonstancoj estis multe pli malfacilaj ol niaj – ĝi estis tre malfacila por la plej multaj, kaj eĉ celis iĝi denaska lingvo. Aliflanke, nia lingvo estas tre facila, kun longa historio kaj granda literaturo, havas multajn parolantojn, kaj ne celas esti denasklingvo sed nur komunikilo. Do, de la historio de la moderna hebrea, ni mem povas scii, kiel ni ankaŭ devas sciigi la mondon, ke la ekuzado de konstruita lingvo en granda amplekso ne nur eblas, sed jam okazis, kaj ke Esperanto certe povos atingi siajn celojn, kiel faris la hebrea.

## PONDUS

n-ro 49



© Overli. distr. strandoverli@yahoo.com

## La ĉemizo

Mi aĉetis ĉemizon.

«Kial la ĉemizo estas ruĝa, kaj ne verda?» demandas iu.

«...ruĝa ne estas la koloro de la Esperanta movado!»

Mallonga paŭzo.

«Al mi plaĉas la ruĝa koloro», mi respondas.

«Kaj vi malpravas. La tutmonda

Esperanta movado

ne vidas malsamajn kolorojn.

En la okuloj de vera esperantisto

ĉiuj koloroj estas la samaj, nur eksistas

malsamaj homoj.»

*-la komentisto*

